

KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI)

www.ueci.it

"Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue" (Paolo VI)

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 -
Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli -
Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62
stampato da atena.net - Grignano di Zocco (VI)

Anno 97 - n. 1
GENNAIO - FEBBRAIO 2018

51^a Monda Tago de la PACO

1a de Januaro 2018

***Migranti e rifugiati:
uomini e donne in cerca di pace***

***Migrintoj kaj rifuĝintoj:
homoj priserĉantaj pacon***

Il messaggio è datato: Vaticano, 13 novembre 2017. Memoria di Santa Francesca Cabrini, Patrona dei Migranti.

Eccone un breve riassunto:

La mesaĝo estas datita: Vatikano, 13an de Novembro 2017. Memorigo de S-ka Franĉeska Kabrini, Patronino de la migrantoj.


Jen ĝia mallonga resumo:

1. Augurio di pace

Pace a tutte le persone e a tutte le nazioni della terra! La pace è un'aspirazione profonda di tutte le persone e di tutti i popoli. Oltre 250 milioni di migranti nel mondo, dei quali 22 milioni e mezzo rifugiati, uomini, donne e bambini cercano un luogo dove vivere in pace e per trovarlo, sono disposti a rischiare la vita, a subire fatiche e sofferenze, ad affrontare reticolati e muri.

2. Perché così tanti rifugiati e migranti?

Il crescente numero di profughi è conseguenza della sequela di guerre, di genocidi, e "pulizie



Pentris Bernardette Lopez

1. Bondeziro de paco

Pacon al ĉiuj homoj kaj al ĉiuj nacioj de la tero! La paco estas aspiro de ĉiuj homoj kaj de ĉiuj popoloj. Pli ol 250 milionoj da migrantoj, el kiuj 22 milionoj kaj duono da rifuĝintoj, viroj, virinoj, kaj infanoj, serĉas lokon, kie vivi en paco, kaj, por ĝin trovi, ili estas pretaj riski la vivon, subteni lacojn kaj suferojn, alfronti drat-barilojn kaj murojn.

2. Kial tiom multe da rifuĝintoj?

La kreskanta nombro de rifuĝintoj estas la sekvo de la vico de militoj, de genocidoj

etniche” che hanno segnato il XX secolo; ma si emigra anche per il desiderio di una vita migliore, di lasciarsi alle spalle la disperazione di un futuro impossibile da costruire.

3. Con sguardo contemplativo

Abbiamo bisogno di rivolgere sulla città in cui viviamo uno sguardo contemplativo, che scopra quel Dio che abita nelle case, nelle strade, nelle piazze promuovendo la solidarietà, la fraternità, il desiderio di bene, di verità, di giustizia, di accorgerci che tutti facciamo parte di una sola famiglia, migranti e popolazioni locali che li accolgono, e tutti hanno lo stesso diritto ad usufruire dei beni della terra; di scoprire che i migranti e i rifugiati non arrivano a mani vuote: portano un carico di coraggio, capacità, energie e aspirazioni, oltre ai tesori delle loro culture native.

4. Quattro pietre miliari per l'azione

“Accogliere”: ampliare le possibilità di ingresso legale e non respingere profughi e migranti verso luoghi dove li aspettano persecuzioni e violenze, e di bilanciare la preoccupazione per la sicurezza nazionale con la tutela dei diritti umani fondamentali.

“Proteggere”: riconoscere e tutelare l’inviolabile dignità di coloro che fuggono da un pericolo reale in cerca di asilo e sicurezza.

“Promuovere”: sostenere lo sviluppo umano di migranti e rifugiati. Assicurare ai bambini e ai giovani l’accesso a tutti i livelli di istruzione, perché possano coltivare e mettere a frutto le proprie capacità, così da coltivare uno spirito di dialogo anziché di chiusura o di scontro.

“Integrare”: permettere a rifugiati e migranti di partecipare pienamente alla vita della società che li accoglie, in vista di un arricchimento reciproco e di una feconda collaborazione nella promozione dello sviluppo umano integrale delle comunità locali.

5. Una proposta per due Patti internazionali

Si auspica che il 2018 conduca all’approvazione da parte delle Nazioni Unite di due patti

kaj “etnaj purigoj” kiuj markis la 20-an jarcenton; sed oni elmigras ankaŭ por la deziro de pli bona vivo, por forlasi la malesperon pro neebbla estonteco.

3. Kontempla rigardo

Ni bezonas turni al la urbon, en kiu ni loĝas, kontemplan rigardon, kiu malkovru tiun Dion loĝantan en la domoj, en la stratoj, en la placoj, favorante la solidarecon, la fratecon, la deziron de bono, de vero, de justeco; ekkonscii, ke ni ĉiuj estas anoj de la sama familio, enmigrintoj kaj la lokaj popoloj, ilin gastigantaj, kaj ke ĉiuj havas la saman rajton ĝui la bonojn de la tero; malkovri, ke la migrantoj kaj la rifuĝintoj ne alvenas kun malplenaj manoj: ili kunportas ŝarĝon de kuraĝo, kapabloj, energioj kaj revoj, krom trezoroj de siaj originaj kulturoj.

4. Kvar mejloŝtonoj por la agado

“Akcepti”: pliiĝi la laŭleĝan enir-eblecon kaj ne forpuŝi la rifuĝintojn kaj migrantojn al lokoj, kie atendas ilin persekutoj kaj perfortoj, kaj ekvilibrigi la zorgojn pri la nacia sekureco kun la defendo de la fundamentaj homaj rajtoj.

“Protekti”: agnoski kaj protekti la netuŝeblan dignon de tiuj, kiu forfuĝas el reala danĝero serĉe de azilo kaj sekureco.

“Antaŭenigi”: subteni la homan evoluigon de la migrintoj kaj rifuĝintoj. Sekurigi al la infanoj kaj al la junuloj la aliron al ĉiuj niveloj de instruado, por ke ili povu kulturi kaj praktiki siajn kapablojn, por flegi spiriton de dialogo anstataŭ de fermiteco aŭ kolizio.

“Integrigi”: Permesi al la rifuĝintoj kaj migrintoj, ke ili plene partoprenu en la vivo de la komunumo, kiu ilin akceptas, cele de reciproka pliriĉigo kaj de fruktodona kunlaboro en la homa plena evoluigo de la lokaj komunumoj.

5. Propono pri du Internaciaj paktoj

Oni esprimas la deziron, ke la jaro 2018 konduku al la aprobado fare de la Unuiĝin-

globali, uno per migrazioni sicure, ordinate e regolari, l'altro riguardo ai rifugiati. Questi patti rappresenteranno un quadro di riferimenti per proposte politiche e misure pratiche. Per questo è importante che siano ispirati da compassione, lungimiranza e coraggio,

6. Per la nostra casa comune

Molti nella storia hanno creduto che l'umanità possa divenire sempre più famiglia di tutti, hanno creduto in questo "sogno" e hanno dato testimonianza che non si tratta di una utopia irrealizzabile. Tra costoro Santa Francesca Saverio Cabrini, di cui ricorre nel 2017 il centenario della nascita al cielo. Questa piccola grande donna, ci ha insegnato come accogliere, proteggere, promuovere ed integrare questi nostri fratelli e sorelle.



taj Nacioj de du tutmondaj paktoj, unu por migradoj sekuraj, ordigitaj kaj laŭregulaj, la alia pri la rifuĝintoj. Ĉi tiuj paktoj estos gvidokadroj por politikaj proponoj kaj praktikaj rimedoj. Pro tio gravas, ke ili estu inspiritaj de kompato, klarvideco kaj kuraĝo.

6. Por nia komuna domo

Multnombraj en la historio kredis, ke la homaro povas fariĝi ĉies familio, ili kredis pri ĉi tiu "revo" kaj donis atestadon, ke tio ne estas nebla utopio. Inter ili S-akta Franĉeska Saverjo Kabrini, kies centjariĝo de la naskiĝo al la ĉielo okazis en 2017. Ĉi tiu eta granda virino, instruis nin, kiel akcepti, protekti, antaŭenigi kaj integri ĉi tiujn niajn gefratojn.

Il testo del messaggio del Papa per la 51a Giornata Mondiale della Pace si può trovare qui: <http://w2.vatican.va/content/francesco/it/messages/peace/index.html>

Intenzioni dell'Apostolato della Preghiera 2018 Intencoj de la Preĝa Apostol-agado 2018

Pubblichiamo le intenzioni che il Papa ha affidato alla sua rete mondiale di preghiera per il mese di gennaio e febbraio 2018.

L'intenzione mensile proposta può essere: o "per l'evangelizzazione" o "universale".

Gennaio (per l'evangelizzazione):

Perché, nei paesi asiatici, i cristiani, come pure le altre minoranze religiose, possano vivere la loro fede con tutta libertà.

Febbraio (universale):

Perché coloro che hanno un potere materiale, politico o spirituale non si lascino dominare dalla corruzione.

Ni diskonigas la preĝ-intencojn konfiditajn de la Papo al sia tutmonda preĝ-reto por la monatoj Januaro kaj Februaro 2018.

Ĉiu sugestata monata intenco povas esti: aŭ "por la evangelizado" aŭ "universala".

Januaro (por la evangelizado):

Por ke en la aziaj landoj, la kristanoj, kiel ankaŭ la aliaj religiaj malplimultoj, povu travivi sian fidon tute libere.

Febbruaro (universala):

Por ke tiuj kiuj tenas povon materian, politikan aŭ spiritan, ne lasu sin regi de la koruptado.

Settimana di preghiera per l'Unità dei Cristiani (18-25 gennaio 2018)

“Potente è la tua mano, Signore”

(Esodo 15, 6)

Il tema quest'anno è proposto dai cristiani della Regione dei Caraibi ed è preso dal cantico innalzato da Mosè e dagli Israeliti dopo il passaggio del Mar Rosso:

*Voglio cantare al Signore,
perché ha mirabilmente trionfato:
cavallo e cavaliere
ha gettato nel mare.*

*Mia forza e mio canto è il Signore,
egli è stato la mia salvezza.*

*È il mio Dio:
lo voglio lodare ...*

*La tua destra, Signore,
è gloriosa per la potenza,
la tua destra, Signore,
annienta il nemico.*

I Caraibi sono segnati dal progetto di sumanizzazione di sfruttamento coloniale. Nel perseguire i loro fini i colonizzatori perpetrarono un sistema brutale di tratta di esseri umani e di lavori forzati. I cristiani dei Caraibi, appartenenti a diverse tradizioni, vedono la mano di Dio nella fine della schiavitù. Per questo la scelta del cantico di Mosè e Miriam: La mano di Dio che condusse il popolo d'Israele fuori dalla schiavitù, continua a infondere speranza ai cristiani dei Caraibi. Nel testimoniare questa comune speranza le chiese lavorano insieme nel servizio a tutte le popolazioni della regione.

Preĝ-semajno por la Unueco de la Kristanoj (18-25a de Januaro 2018)

“Potenca estas via mano, Sinjoro”

(Eliro 15, 6)

La ĉijara temo estas proponata de la kristanoj de la Kariba Regiono, kaj ĝi estas elĉerpita de la kanto de Moseo kaj de la Israelidoj post la eliro el Ruĝa Maro:

*Mi kantos al la Sinjoro,
ĉar li alte levigis:
ĉevalon kaj ĝian rajdanton
li ĵetis en la maron.*

*Mia forto kaj glorkanto estas la Sinjoro,
li estis por mi savo.*

*Li estas mia Dio,
kaj mi lin gloros ...*

*Via dekstra mano, Sinjoro,
estas glora per forto,
via dekstra mano, Sinjoro,
disbatas la malamikon.*



La nunaj karibaj landoj estas profunde signitaj de la kolonia malhumaniganta eks-pluatado. Strebante al sia celoj, la koloniistoj plenumis brutalan sistemon de homkomerco kaj de perfortitaj laboroj. La karibaj kristanoj, apartenantaj al diversaj tradicioj, vidas la manon de Dio en la fino de la sklaveco. Pro tio la elekto de la kantiko de Moseo kaj Miriam: La mano de Dio, kiu kondukis la Izraelan popolon ekster la sklavecon, daŭrigas inspiri esperon al la karibaj kristanoj. Atestante ĉi tiun komunan esperon, la eklezioj kune laboras en la servo de ĉiuj loĝantoj de la regiono.

I testi, in varie lingue, per la preparazione della Settimana di Preghiera si possono trovare qui:
www.vatican.va/roman_curia/pontifical_councils/chrstuni/sub-index/index_index_weeks-prayer_it.htm



FRANCISKANAJ FONTOJ

Zorge de frato Pierluigi Svaldi

Parafrasi del «Padre nostro»

Francesco d'Assisi si immergeva nella preghiera: la meditava, la gustava e la amplificava con l'esperienza e con la vita. Così abbiamo una interessante parafrasi della preghiera di Gesù.

Analizzando le varie composizioni che ci sono pervenute, possiamo riscontrare le fonti ispiratrici della preghiera di san Francesco: soprattutto i Salmi, il Vangelo e la Liturgia Eucaristica.

Già all'inizio della sua conversione, quando restituì a suo padre il denaro e i vestiti, Francesco si sbilanciò a favore del Padre che è nel cielo, smarcandosi da quello terreno. Qui possiamo assaporare un frutto maturo della preghiera di san Francesco.

O santissimo Padre nostro: creatore, redentore, consolatore e salvatore nostro.

Che sei nei cieli: negli angeli e nei santi, e li illumini alla conoscenza, perché tu, Signore, sei luce; li infiammi all'amore, perché tu, Signore, sei amore; poni in loro la tua dimora e li riempi di beatitudini, perché tu, Signore, sei il sommo bene, eterno, dal quale proviene ogni bene e senza il quale non esiste alcun bene.

Sia santificato il tuo nome: si faccia luminosa in noi la conoscenza di te, perché possiamo conoscere qual è l'ampiezza dei tuoi benefici, l'estensione delle tue promesse, la sublimità della tua maestà e la profondità dei tuoi giudizi.



Parafrazo de «Patro nia»

Francisko el Asizo ensorbigis en la preĝon: li primeditis ĝin, li priĝuis ĝin kaj li plivastigis ĝin per la sperto kaj per la vivo. Nu, ni havas interesan parafrazon de la preĝo de Jesuo.

Analizante la diversajn verkaĵojn al ni alvenintajn, ni povas konstati la inspirajn fontojn de la preĝo de sankta Francisko: ĉefe la Psalmojn, la Evangelion la Eŭkaristian Liturgion.

Jam komence de sia konvertiĝo, kiam li redonis al sia patro la monon kaj la vestaĵojn, Francisko orientiĝis favore al la Patro, kiu estas en la ĉielo, deĝante de tiu tera. Ĉi tie ni povas gustumi maturan frukton de la preĝo de sankta Francisko.

Ho sanktega Patro nia: kreinto, elaçetinto, konsolanto kaj nia savanto.

Kiu estas en la ĉieloj: en la anĝeloj kaj en la sanktuloj, kaj vi iluminas ilin al la kono, ĉar vi, Sinjoro, estas lumo; vi flavigas ilin al la amo, ĉar vi, Sinjoro, estas amo; vi enloĝiĝas en ilin kaj plenigas ilin per beateco, ĉar vi, Sinjoro, estas la plejbono, la eterna bono, el kiu fontas ĉiu bono, kaj sen kiu tute ne ekzistas bono.

Sanktigata estu via nomo: lumiĝu en ni la kono pri vi, por ke ni povu kompreni, kiaj estas la vasteco de viaj donacoj, la amplekso de viaj promesoj, la sublimeco de via majesto kaj la profundeco de viaj juĝoj.

Venga il tuo regno: affinché tu regni in noi per mezzo della grazia e ci faccia giungere nel tuo regno, dove la visione di te è senza veli, l'amore di te è perfetto, la comunione con te è beata, il godimento di te senza fine.

Sia fatta la tua volontà, come in cielo così in terra: affinché ti amiamo con tutto il cuore, sempre pensando te; con tutta l'anima sempre desiderando te; con tutta la mente, indirizzando a te tutte le nostre intenzioni e in ogni cosa cercando il tuo onore; e con tutte le nostre forze, spendendo tutte le nostre energie e i sensi dell'anima e del corpo in offerta di lode al tuo amore e non per altro; e affinché amiamo i nostri prossimi come noi stessi, attirando tutti secondo le nostre forze al tuo amore, godendo dei beni altrui come fossero nostri e nei mali soffrendo insieme con loro e non recando alcuna offesa a nessuno.

Il nostro pane quotidiano: il tuo Figlio diletto, il Signore nostro Gesù Cristo, dà a noi oggi: in memoria e comprensione e venerazione dell'amore che egli ebbe per noi e di tutto quello che per noi disse, fece e patì.

E rimetti a noi i nostri debiti: per la tua ineffabile misericordia, per la potenza della passione del tuo Figlio diletto e per i meriti e l'intercessione della beatissima Vergine e di tutti i tuoi eletti.

Come noi li rimettiamo ai nostri debitori: e quello che noi non rimettiamo pienamente, tu, Signore, fa' che pienamente perdoniamo, cosicché, per amor tuo, amiamo sinceramente i nemici e devotamente intercediamo per loro presso di te, non rendendo a nessuno male per male e impegnandoci in te ad essere di giovamento in ogni cosa.

E non ci indurre in tentazione: nascosta o manifesta, improvvisa o insistente.

Ma liberaci dal male: passato, presente e futuro. (FF 266-275).

Francesco suggerisce di proseguire con il "Gloria al Padre...", per finire come si era iniziato, invocando la Trinità.

Venu via regno: per ke vi regnu en ni per la graco kaj alvenigu nin en vian regnon, kie la rigardo al vi estas sen vualoj, la amo al vi estas perfekta, la komuneco kun vi estas beata, la ĝuado de vi estas senfina.

Fariĝu via volo, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero: por ke ni amu vin tutkore, ĉiam pensante pri vi; per la tuta animo ĉiam dezirante vin; per la tuta menso, adresante al vi ĉiujn niajn intencojn kaj en ĉio serĉante vian honoron; kaj per ĉiuj niaj fortoj, eluzante ĉiujn niajn energiojn kaj la sentojn de la animo kaj de la korpo kiel laŭd-ofero al via amo kaj al nenio alia; kaj por ke ni amu niajn proksimulojn kiel nin mem, altirante ĉiujn laŭ niaj fortoj al via amo, ĝuante pri aliaj bonaĵoj, kiel ili estus niaj kaj en la malbonoj tolerante kune kun ili kaj alportante al neniu ajnan ofendon.

Nian panon ĉiutagan: vian amatan Filon, nian Sinjoron Jesuon Kriston, donu al ni hodiaŭ: pro memorigo kaj kompreno kaj venerado de la amo, kiun li havis por ni, kaj de ĉio, kion li diris, faris kaj suferis por ni.

Kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn: pro via neesprimebla mizerikordo, pro la potenco de la pasiono de via amata Filo kaj pro la meritoj kaj propetado de la beatega Virgolino kaj de ĉiuj viaj elektitoj.

Kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj: kaj tion, kion ni ne plenplene pardonas, vi, Sinjoro, faru ke ni plenplene pardonu, tiel ke, pro via amo, ni sincere amu la malamikojn kaj devote propetu vin por ili, ne redonante al iu malbonon kontraŭ malbono kaj engaĝigante en vi doni utilon en ĉio ajn.

Kaj ne konduku nin en tenton: kaŝitan aŭ malkaŝan, subitan aŭ insistan.

Sed liberigu nin de la malbono: estinta, estanta kaj estonta. (FF 266-275).

Francisko konsilas daŭrigi per la "Gloro al la Patro...", por fini kiel oni komenciĝis, preĝe alvokante la Triunuon.



Pri nia Lingvo

La zamenhofa ideo.

Presto si sentì la necessità di una rivista in esperanto, con la quale i primi esperantisti potessero famigliarizzare con la lingua, porre domande a Zamenhof e formare una prima comunità internazionale. Nacque così “**LA ESPERANTISTO, GAZETO POR LA AMIKOJ DE LA LINGVO ESPERANTO**” edita in Norimberga per iniziativa di un esperantista tedesco, Christian Schmidt, pioniere dell'esperanto in Germania. Ne fu redattore Zamenhof stesso. Il primo numero uscì il 1° settembre 1889 con cadenza mensile. Grazie alla sua esistenza la rivista contribuì alla crescita della lingua e alla sua stabilità. Il contributo di Zamenhof fu essenziale sia per la cura dello stile, sia per le risposte date alle numerose domande sulla lingua poste dai lettori. Queste risposte costituiscono il nucleo iniziale del volume “**LINGVAJ RESPONDOJ**” in cui saranno raccolte le risposte date da Zamenhof in questa rivista e in altre successive.

LA ESPERANTISTO ha avuto fin dall'inizio una vita difficile per le difficoltà economiche dovute all'iniziale scarso numero di abbonati. Per questo già alla fine del 1891, Zamenhof pensava di abbandonare l'impresa quando intervenne Wilhelm Heinrich Trompeter, un esperantista prussiano che si offrì di pagare i costi della pubblicazione. Nella rivista, oltre a temi linguistici venivano pubblicati racconti, poesie, notizie,

consigli per la casa, articoli scientifici; tutto in un linguaggio fluido e facile.

Iniziarono però anche i primi contrasti. Tramite la rivista alcuni esperantisti proponevano delle riforme da apportare alla lingua. Ne nacque un dibattito il cui effetto fu quello di inibire la produzione letteraria in attesa di eventuali riforme. La richiesta veniva anche da importanti esperantisti e dallo stesso Trompeter che minacciava di ritirarsi se non si fosse affrontato questo tema.

Perciò Zamenhof nel 1894, cercando di mediare tra le varie idee avanzate, propose un “esperanto riformato” da sottoporre al voto dei lettori di LA ESPERANTISTO. Si poteva porre il voto su una delle quattro soluzioni: 1) nessuna riforma 2) la riforma proposta 3) una riforma diversa 4) la riforma proposta con qualche modifica. Su 264 votanti, 157 – cioè la maggioranza – votarono contro ogni riforma. Da questo momento poté iniziare tranquillamente la produzione di opere letterarie in esperanto.

Non fu altrettanto tranquilla la vita della rivista. L'anno seguente – a quanto sembra a causa della pubblicazione di un articolo di Tolstoj, “Prudento kaj kredo” – la censura zarista ne proibì la distribuzione nel territorio russo dove risiedeva la maggior parte degli abbonati. Fu così che la rivista dovette cessare le pubblicazioni: l'ultimo numero uscì nel maggio del 1885.



Ĉe la voj-komenco.

Delle 45 parole correlative (*tabelvortoj*) alcune sono di uso più frequente di altre. Tra queste ne esaminiamo due, che possono creare qualche incertezza.

Kia? Kiel? Nelle preposizioni interrogative ambedue traducono l'italiano 'come?' però con diverso significato:

Kia? = 'quale tipo?, che specie?' quindi, come risposta, ci si attende un attributo.

Kiel? = 'in quale maniera?, in quale grado?, in quali circostanze?' e la risposta riferisce una modalità.

Semplificando: a *kia* si risponde con un aggettivo, a *kiel* con un avverbio.

Inoltre *kia* è un aggettivo, quindi si usa, o per il predicato nominale (cioè associato al verbo essere), o come attributo ad un sostantivo o pronome.

Qualche esempio di domanda e risposta:



Predicato nominale:

– *Kia estas via domo?* → Ĝi estas granda.

– *Come* è la tua casa? → È grande.

Attributo (in questo caso *kia* non traduce il 'come' italiano):

– *Kian aŭton vi havas?* → Tre malgrandan.

– *Che* [tipo di] auto hai? → Molto piccola.

Notare la differenza con:

– *Kiun aŭton vi havas?* → Aŭton Fiat 500.

– *Che* auto hai? → Un'auto Fiat 500

(In italiano le due domande possono essere uguali, però nel primo caso – con *kia* – si chiede una qualità e nel secondo caso – con *kiu* – una identità.

Altro esempio:

– *Kia estis lia respondo?* → Diplomacia.

– *Come* fu la sua risposta? → Diplomatica

– *Kian respondon li donis?* → Diplomatican.

– *Che* risposta ha dato? → Diplomatica.

– *Kiun respondon li donis?* → Ke li venos.

– *Che* risposta ha dato? → Che verrà.

Quanto detto vale anche per le domande indirette:

– *Diru, kia estas via aŭto* → Ĝi estas nova.

– Dimmi *come* è la tua auto → È nuova.

– *Vidu, kian aŭton li havas.* → Sportan.

– Vedi *che* auto ha. → Sportiva

– *Vidu, kiun aŭton li havas* → Aŭton Fiat .

– Vedi *che* auto ha. → Un'auto Fiat.

Invece 'kiel' è un avverbio e, come tale, è normalmente associato a un verbo:

– *Kiel li respondis?* → Diplomate.

– *Come* ha risposto? → Diplomaticamente

– *Kiel vi iros hejmen?* → Per biciklo.

– *Come* andrai a casa? → In bicicletta.

– *Kiel vi fartas?* → Tre bone.

– *Come* stai? → Molto bene.

– *Kiel vi renkontis lin?* → Surstrate.

– *Come* lo hai incontrato? → Per strada.

Idem per le domande indirette:

– *Vidu, kiel li stiras.* → Prudente.

– Vedi *come* guida. → Con prudenza.

– *Diru al mi, kiel vi fartas* → Ne tro bone.

– Dimmi come stai → Non troppo bene.

Attenzione, però: l'avverbio non si usa solo in relazione ad un verbo, ma anche ad un aggettivo o a un altro avverbio; perciò

anche in questi casi si usa *kiel*, anche per il predicato nominale:

Ad esempio:

– Vedi come è bella quella ragazza!

– *Vidu, kiel bela estas tiu knabino!*

e non: – *Vidu kia bela estas tiu knabino!*

– Sono povero come te.

– *Mi estas malriĉa kiel vi.*

e non: – *Mi estas malriĉa kia vi.*

(In questo caso *vi* è un pronome, però è sottinteso il verbo: *kiel vi estas malriĉa*).

Kia e *Kiel* si usano anche in forma relativa quasi sempre accoppiata con quella dimostrativa (*tia, kia* = ‘tale, quale’ e *tiel, kiel* = ‘così, come’).

In questi casi *kia* si traduce con ‘quale’, da non confondere con ‘il quale’ = *kiu*.

Ad esempio:

– Quale la madre, tale la figlia

– *Kia la patrino, tia la filino.*

(Il verbo *estas* è sottinteso).

Però con l’aggettivo si usa l’avverbio:

– È bella (così), come sua madre.

– *Ŝi estas (tiel) bela, kiel sia patrino.*

– Sia fatta la tua volontà, come in cielo, così anche sulla terra.

– *Fariĝu Via volo, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero.*

Nota bene: ‘come’, se non usato per porre una domanda, si traduce con *kiel*. Vediamo qualche esempio dal libro dei Salmi:

– ‘Sarà come albero piantato presso torrenti d’acqua’ (Sal. 1).

– *Li estos kiel arbo, plantita apud akvaj torrentoj* (Psa 1).

– Sono come un sordo, e non odo. (Sal 13)

– *Mi estas kiel surdulo kaj ne aŭdas* (Psa 13).

Da questo si deduce che *kiel* è molto più usato di *kia*. Nella versione in esperanto del libro dei Salmi, il più lungo della Bib-

bia, troviamo 255 *kiel* e solo 4 *kia*.

Vediamo altre due correlative poco usate che, proprio per questo, meritano un po’ di attenzione.

Kies e *ties*. Sono due aggettivi invariabili, cioè non hanno la desinenza del plurale né dell’accusativo.

Kies? – interrogativo – significa ‘di chi’, anche nelle domande indirette.

Ad esempio:

– Di chi sei figlia?

– *Kies filino vi estas?*

– I figli di chi hai incontrato?

– *Kies gefilojn vi renkontis?*

– Chiedi loro di chi sono figli

– *Demandu ilin, kies gefiloj ili estas?*

Kies – non interrogativo – significa ‘il cui / del quale’. Ad esempio:

– Aveva un figlio il cui nome era Saul

– *Li havis filon, kies nomo estis Saul.*

Usato anche come pronome con il significato ‘di chi’:

– I peccati di chi perdonerete, a quelli saranno perdonati (Gio 20,23)

– *Kies pekojn vi pardonos, al tiuj ili estas pardonitaj* (Joh 20,23)

Ties è aggettivo o pronome dimostrativo e significa ‘di questi / di costui’ ed è usato in sostituzione del pronome personale quando questo può dare adito a qualche ambiguità; in questo caso significa ‘di quest’ultimo’.

Se diciamo:

– Mentre Giovanni picchiava Pietro, venne suo padre –

non sappiamo se è padre di Giovanni o di Pietro. In esperanto:

– *Dum Johano batis Petron, venis ties patro*, si tratta del padre di Pietro.

– *Dum Johano batis Petron, venis lia patro*, si tratta del padre di Johano.

Vediamo questa frase tratta dal 1° libro dei Maccabei:

Kiam Lisias eksciis, ke mortis la reĝo, li proklamis ties filon Antioĥo, kies edukadon li prizorgis, kiel reĝon. (6,17)

In una traduzione letterale in italiano la frase risulta alquanto ambigua:

Quando Lisia seppe che il re era morto, proclamò suo figlio Antioco, della cui educazione si occupò, come re.

Non si sa se Antioco sia figlio di Lisia o

del re e si può pensare che Lisia, quando era re, si occupasse dell'educazione di Antioco. L'esperanto è chiaro: Antioco è figlio del re (*ties filon*) e viene proclamato re (*kiel reĝon*) da Lisia.

Ties, come pronome, significa 'di colui':

- Il mio insegnamento non è mio, ma di Colui che mi ha mandato. (Gv 7,16)
- *Mia instruado estas ne mia, sed Ties, kiu min sendis.* (Joh 7,16).

Survoje al la bona lingvo.

L'avverbio *kiel* ha diverse funzioni: interrogativa (in forma diretta o indiretta):

– *Kiel eblas gajni multe da mono?*

– *Mi ne scias kiel gajni multe da mono.* quella esclamativa:

– *Kiel granda estas via boneco!*

e, come congiunzione, nel comparativo di eguaglianza tra:

– azioni (*barakti kiel fiŝo ekster la akvo*),

– qualità (*bela kiel la anĝelo*),

– entità (*mi estas kiel vi*) e simili,

o anche con il significato di: 'in qualità di / essendo' (*Mi laboras kiel instruisto – Oni dungis min kiel instruiston*).

Data la molteplicità di significati, quando *kiel* ha il significato di 'in quale modo', si può usare in alternativa *kiamaniere*. Analogamente per *tiel*, si usa talvolta *tiamaniere*.

Ad esempio:

– Voglio vedere come lavori.

– Lavoro così per risparmiare tempo.

– *Mi volas vidi, kiamaniere vi laboras.*

– *Mi laboras tiamaniere, por ŝpari tempon.*



Nel saggio di H.A. de Hoog, citato nell'ultimo numero, c'è un esempio dell'uso di *kiel* come comparativo, preso da un testo di Teo Jung:

Petro estas alta kiel giganto, li estas filo de la sama popolo kiel mi, kaj loĝas en la sama urbo kiel mi, kie li vizitis la saman lernejon kiel mi. Dum la pasinta somero li intencis vojaĝi en la saman regionon kiel mi, eĉ je la sama tempo kiel mi, sed li devis rezigni tiun intencon pro la sama kaŭzo kiel mi. Tial ni nun kune iros al la Universala Kongreso, kiu ĉi jare estos en la sama lando kaj je la sama dato kiel la Olimpaj Ludoj.

Notare quanto sia più pesante il medesimo testo con l'uso di *ki-vortoj* apparentemente più appropriate, ma erronee:

Petro estas alta kia giganto, li estas filo de la sama popolo kies mi, kaj loĝas en la sama urbo kie mi, kie li vizitis la saman lernejon kiun mi. Dum la pasinta somero li intencis vojaĝi en la saman regionon kien mi, eĉ je la sama tempo kiam mi, sed li devis rezigni tiun intencon pro la sama kaŭzo kial mi. Tial ni nun kune iros al la Universala Kongreso, kiu ĉi jare estos en la sama lando kie kaj je la sama dato kiam la Olimpaj Ludoj.

Nia eta Parnaso

Rubrica dedicata alla Poesia

Rubriko dediĉita al Poezio

NOI IN UNO

Quando cadrà il silenzio
e il nero della notte
oscurerà anche le stelle,
io, dal profondo incerto,
ti tenderò le braccia...

E tu
mi leverai all'estasi
del tuo cielo.

Uniti avvinti
aleggeremo
in aure purissime
infinite.

Noi in uno: pura essenza
dell'Eterno.

PAGINA BIANCA

Pagina bianca
amica dei miei pensieri
discreta unica
dei miei più riposti
e inconfessati moti.
"Sfoghi dell'anima" che,
come mare gonfio
di uragano
l'onda trabocca
e scivola
sulla battigia accolta
e silenziosa, così l'onda
delle mie emozioni sale
e trabocca in te,
pagina amica

Anna Amorelli Gennaro

NI UNUECE

Kiam falos la silento
kaj la noktonigro
malheligos eĉ la stelojn,
mi, el malcerta profundo
al vi etendos la brakojn...

Kaj vi
min levos al la ekstazo
de via ĉielo.

Unuiĝe alkroĉiĝintaj
ni ŝvebos
en puregaj brizoj
senlimaj.

Ni unuece: pura esenco
de l' Eternulo.

BLANKA PAĜO

Blanka paĝo
amika de miaj pensoj
diskreta unika
el miaj plej kaŝitaj
kaj nekonfesitaj impulsoj.
"Anim-eksplodoj" kiuj,
kiel ŝvela maro
de uragano,
elbordigas l' ondon
kaj glitas
sur la strando akcepta
kaj silenta, tiel l'ondo
de miaj emocioj altiĝas
kaj elverŝiĝas en vin,
amika paĝo.

(esperantigis Norma Cescotti)

Sankta Francesca Cabrini

La ĉiela patronino de ĉiuj elmigrantoj

(prelego de Norma Cescotti dum la UECEI-kongreso 2017)

“Ĉiela patronino de ĉiuj elmigrantoj” tiel Papo Pio la 12a, en la jaro 1950, proklamis Patrino Cabrini, de li kanonigita en la jaro 1946. Ŝi estis jam beatigata en la jaro 1938 de Papo Pio la 11a.

Francesca Cabrini naskiĝis en Sant'Angelo Lodigiano (Lombardio) la 15an de julio 1850, deka filino de Agostino kaj Stella Oldini. El humilaj originoj ŝi havis en sia fratino Rosa sian unuan edukantnon kaj instruistino, kiu kuraĝigis ŝin entrepreni la saman ciklon de studado.



Naskiĝdomo de Francesca Cabrini

Francesca diplomiĝis kiel instruistino por elementa lernejo, en la jaro 1868, en Sant'Angelo kaj komencis sian unuan instruon sperton en Castiraga Vidardo, kie ŝi havis eblecon esti de ĉiuj amata kaj kie ŝi ekkonis pastron Antonon Serrati, estontan preposton de Codogno. Li donis decidan vojturon al ŝia vivo.

La familio Cabrini estis tre pia: ĉiuvespere paĉjo Agostino legadis al siaj multenombraj familianoj la “*Analoj de la*

Propagando de la Kredo”, kaj tiu ĉi vespera legado arde interesadis Francescan al la historio de la misiistoj, tiel ke, iom post iom, naskiĝis en ŝi projektoj pri estonta misiista agado en la mistera Ĉinio.

Inter 1870 kaj 1872 Francesca konis siajn plej malfacilajn jarojn: forpasis ambaŭ gepatroj kaj epidemio pri variolo intense trafis ŝin. Post la resaniĝo ŝi decidiĝis forferi sian tutan vivon al la misiista apostolado.

En la jaro 1874 ŝi revenis al Codogno, post peto de ties parokestro, por praktiki instruadon en la loka orfejo, kiu sekve fariĝis nova kolegia instituto, de ŝi fondita kune kun sep kunfratinoj, kaj nomumita “*Instituto de la Sankta Koro*”. Francesca havis tridek jarojn kaj firmegan volon realigi iun tagon sian infanan sonĝon: Ĉinion. Sed Papo Leono la 13a ŝanĝigis al ŝi opinion tiel ke, sekvante lian konsilon, en la jaro 1889 ŝi forveturis al Ameriko – celpunkto la urbo New Jork – akompanata de iuj misiistaj fratinoj, kun firma certeco pri la Dia Volo kaj sia estonta pormisia agado. Tien ŝi renkontis la unuajn malfacilaĵojn. Ŝi ekkonis la ĉefepiskopon Michael Corrigan, unu el la plej obstinaj kontestantoj al ŝia projekto, kiu klopodis senkuraĝigi tiun roton de fratinoj temeraraj kaj ... italaj. Estis lia opinio ke ili, kvankam laŭŝajne, havantaj multe da kredo, kunportis tre malmulte da mono, elemento nepre esenca kaj abunde necesa, eĉ al la agado por nia Si-

njoro. Li penegis por konvinki ilin ke estus pli saĝa afero reiri al Italio. Tiutempe la amerika katolika Eklezio sin tenis nur sur la financa kontribuo de la fideluloj. Tamen Fratino Francesca kontraŭstaris al lia invito proponante du argumentojn: unu spiritan, la benon de la Papo, kaj la alian materian, la amikecon kun riĉa katolika amerikanino, edzino de la famkonata itala elmigrinto grafo Luigi Palma de Cesnola, direktoro de *Metropolitan Museum*.



Oni ne scias ĉu la argumentoj konvinkis la prelaton. Estas fakto ke fratino Francesca Cabrini daŭrigis laŭ siaj vojo kaj projekto. Ŝi malfermis la unuan virinan lernejon en modesta loĝejo, metita je dispono de la grafino de Cesnola, sed la kunfratinoj engaĝiĝis ankaŭ por asisti kaj instrui en la plej malboniĝintaj kvartaloj de la urbo, plenumante ĉiutage kilometrojn de piedirado kaj enirante sentime en ejojn terurajn pro mizero kaj perforto.

La ĉefepiskopo, fine, permesis al fratino Francesca la malfermon de orfejo por italaj infanoj elmigrintaj. (Hodiaŭ konata kiel “*Domo de Sankta Cabrini*”). De tiam ŝi traveturis la maron preskaŭ ĉiujare kunportante novajn grupojn al Ameriko. En la jaro 1890 ŝi fondis, apud *New Jork*, no-

vicejon translokante tien ankaŭ la orfejon, kaj en la jaro 1892 ŝi starigis en la urbo la “*Columbus Hospital*”. En la jaro 1902 la episkopo de Denver invitis ŝin al Colorado, kie ŝi fondis mision inter niaj elmigrintoj. La sperto de Colorado prezentis alian nepre fundamentan etapon de ŝia vivo.

Ĉe la fino de la 19a jarcento kaj la komenco de la 20a, Italio estis tero de elmigrado. El la italaj marbordo, sed ankaŭ el niaj teraj limoj, la elmigrantoj atakis la “ŝipaĉojn de la maro” tiel nomataj ĉar ili estis tutmondan trafikilojn de niaj samlandanoj, forfuĝantaj el la mizero kaj malsato por trovi eksterlande pli bonan estontecon. Ameriko estis la plej ŝatata celo, tamen, alveninte ĉi-tien, niaj elmigrintoj estis englutataj de la karbonejoj, de la petrolputoj, de la ferindustrioj, de la pontkonstruadoj, de la kotona aŭ tabaka plantejoj kaj tiamaniere ili kontribuadis al la konstruado de la potenca amerika ekonomio. Sed ili konsistigis anoniman popolon el *blankaj sklavo*j, homa materialo marĉandigita ofte de suspektindaj sintruduloj, kiuj ekspluatis iliajn nesciadon kaj bezonon. Ili travivis en homaj svarmejoj, estis konsiderataj duon-sovaĝuloj pretaj al la interbatiĝo kaj perforto, eble ilia nura agmaniero por elmontri sin homaj estaĵoj. Ili estis disponeblaj al ĉio ajn; nomataj “*blankaj negruloj*” kaj, kiel tiuj afrikaj, ili ne rajtis eniri la startrinkejojn. Ili travivis sen protektado, aŭ lernejoj, aŭ malsanulejoj, aŭ preĝejoj. Ili konis ununuran lingvon, sian familian dialekton kaj, ĉar ili devenis de malsamaj regionoj, ofte estiĝis regionismoj malinklinaj, unu kontraŭ la alia, kvankam ili loĝis kune en siaj “*etaj Italioj*”. Amerikaj patrinoj kaj avinoj por kvietigi maltrankvilajn infa-

nojn, tiujn timigis kriante: “*Jen, nun alvenas italo!*” La knaboj kreskis surstrate, destinataj iĝi estontaj kriulaĉoj aŭ ŝuciristoj, kiam ili ne falis en manojn de friponaj ekspluatistoj. Malplibona destino atendis la knabinojn. L'analfabeteco kaj izoligo malfaciligis ian ajn klopodon pri solidareco.

Francesca komencis sian apostolan agadon inter la ministoj, malsuprenirante en la putojn, alportante kuraĝon kaj subtenon al homoj, kiuj en nehoma vivmaniero riskis ĉiutage esti entombigitaj en tiujn tombojn, en kiuj ili laboradis.

Sekve ŝi delokiĝis al Panama, Buenos Aires, Chicago, Pensylwania, New Jersey, Rosario, kaj en Eŭropo, al Barcellona, Parigi, Bilbao, Madrid, Liverpool, ĉie malfermante novajn lernejojn kaj institutojn.

En Italio nur Papo Leone la 13a avertis la gravan problemon de la elmigrintoj en sia famekonata encikliko “*Rerum Novarum*” kaj la episkopo de Piacenza, kiu fondis kongregacion por la prizorgado de la elmigrintoj.

En la jaro 1909a Patrino Cabrini alvenis al Rio de Janeiro kie ŝi batalis duafoje kontraŭ la variolon, savante multajn lernantinojn kaj kunfratinojn de la terura kontaĝo.

Iam en malbona farto, Patrino *Francesca* revenis la lastan fojon al Italio en la jaro 1912. Ŝi alvenis kiel amerika civitanino, obteninte en la jaro 1909 tiun civitan rajton. La lasta etapo de ŝia apostola pilgrimado estis la Columbus Hospital de Chicago, kie ŝi laboris ĝis la morto, okazinta la 22an de decembro de la jaro 1917. Ŝi havis 67 jarojn. Ŝi lasis herede 67 fondaĵojn, (lernejojn, orfejojn, malsa-

nulejojn) en Eŭropo kaj Ameriko, kaj ĉirkaŭ 1300 misiistajn fratinojn.

En la jaro 1926 iuj Kabrinanaj kunfratinoj atingis Ĉinion fondante tien unuan mision, ĝuste por realigi la sonĝon de Patrino Cabrini. Ŝia korpo, eltombigita en la jaro 1931 estas gardita en vitra ĉerko en la altaro de “*Saint Francesca Cabrini Reliquario*”, norde de Manhattan. La strato por ĝin atingi, la “*Cabrini Boulevard*” estas atestanto pri ĉiutagaj procesioj de fideluloj tien irantaj por preĝi “la Sanktulino de la Italoj”.



Ni memoros Patrino Cabrini ne pro teologiaj verkoj aŭ mirakloj, sed pro la simpla humila sankteco, kiun ŝi atingis ne per longtempaj preĝadoj, sed per multaj horoj pasigitaj laborante, ŝvitante, penante, por ke Dio estu konata kaj amata. Sankteco ne plenumita pro ekstazoj aŭ mistikaj riveladoj, sed pro granda socia sindevigo.

Ek de la monato de novembro 2010 la centra stacidomo de Milano portas la nomon de “*Sankta Francesca Saverio Cabrini*”

Fratino Francesca laboradis por Dio kun ĝojo. Ofte ŝi rekomendis al la kunfratinoj “ŝiaj filinoj”: *Ĉu ni fartas malbone? Ni, egale ekridetu!*”

NI FUNEBRAS KAJ KONDOLENCAS

Il 16 novembre 2017 a Milano è improvvisamente deceduta, all'età di 83 anni, Carla Sfardini. Esperantista fin da giovanissima, era una figura attiva sia nel Circolo Esperantista Milanese, di cui era la memoria storica, sia nel Katolika Esperanto-Centro di Milano. Ha partecipato a numerosi congressi universali e locali. Membro dell'Istituto Italiano di Esperanto ha collaborato per molti anni con Glauco Corrado nell'insegnamento della lingua. Noi la ricordiamo in particolare per la sua perfetta dizione nella recitazione di testi e poesie. Rimane memorabile la sua interpretazione del monologo 'Maria' di Roberto Zago (tradotto da Glauco Corrado) nel congresso UECI di Castiglione Torinese del 2004 (vedi: <http://www.ueci.it/eldonoj/verkoj/Maria.pdf>).

Rivolgiamo una preghiera perché il Signore l'accoglia a sé.



NORME E QUOTE ASSOCIATIVE PER L'ANNO 2018

Associato ordinario <i>con Katolika Sento</i> (SO)	22,00 €
Associato giovane <i>con Katolika Sento</i> (SG)	11,00 €
Associato familiare <i>senza Katolika Sento</i> (SF)	11,00 €
Associato ordinario <i>con Espero Katolika</i> (SOE)	43,00 €
Associato sostenitore <i>senza Espero Katolika</i> (SS)	44,00 €
Associato sostenitore <i>con Espero Katolika</i> (SSE)	86,00 €
Solo abbonamento a <i>Katolika Sento</i> (AK)	10,00 €
Solo abbonamento a <i>Espero Katolika</i> (AE)	21,00 €

È associato giovane chi non ha superato i 25 anni. È associato familiare chi convive con altro associato. Specificare nella causale del versamento la categoria dell'associato, l'anno di nascita dei giovani, l'esatto indirizzo per il recapito del periodico K.S., la destinazione di eventuali offerte. I gruppi locali con almeno 10 soci trattengono 2,10 € per l'associato ordinario e 1,05 per l'associato giovane o familiare.

I versamenti vanno fatti sul C.C. Postale n. 47127675 *Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I.*
 codice IBAN: IT66 R076 0101 6000 0004 7127 675 Codice BIC/SWIFT: BPPHITRRXXX

Nota: Sull'etichetta/indirizzo con la quale avete ricevuto questa copia di *Katolika Sento* è indicata la sigla associativa e l'anno di scadenza dell'abbonamento.

COMITATO CENTRALE U.E.C.I.

Presidente: Giovanni DAMINELLI, via Lombardia 37, 20099 Sesto S. Giovanni (MI) – tel. 02.2621149 – katolika.sento@ueci.it (la residenza del presidente è anche sede dell'associazione)

Vice presidente: Norma COVELLI CESCOTTI, via E.Fermi 29, 38100 Trento – tel. 0461.925210

Segretario./cassiere: fra Pierluigi SVALDI, p.za S. Francesco, 1 - 38057 Pergine Valsugana (TN) – tel. 0461.531109

Consulente culturale-religioso: Ida BOSSI, Viale Faenza, 26/7 20142 Milano

Responsabile dei congressi: Giovanni CONTI, via F.Filzi 51, 20032 Cormano (MI) – tel. 02.66301958

Consulente informatico: Tiziana FOSSATI, via F.Filzi 30/A, 20035 Lissone (MB) - tel. 039.464942

Consulente editoriale: Carlo SARANDREA, Via di Porta Fabbrica 15, 00165 Roma – tel. 06.39638129

Addetto alla logistica: Felice SOROSINA, Via Sarnico 17, 24060 Tavernola (BG) – tel. 035.932298 –

Assistente Ecclesiastico: mons. Giovanni BALCONI, p.zza Duomo, 16, 20122 Milano

Nota bene: Tutte le comunicazioni alla redazione di *Katolika Sento* vanno spedite al presidente UECI.

AMUZE

Ĉiuj ajn rajtas kontribui sendante al ni siajn humoraĵojn, kondiĉe ke ili estu en Esperanto.



(el www.gioba.it) - sendis Tiziana Fossati

Hundomordo

Viro iras lame en kuracistan praktikejon:

- Min mordis hundo.
- Ĉu vi metis ion sur ĝin?
- Ne, mia kruro bongustis al ĝi ankaŭ sen io.

(sendis Karl Heinz Schaeffer)

Surplaĝa konversacio

Ĉe la maro, babilante sur la plaĝo, iu diras al najbaro:

- Rigardu kian belan korpon havas tiu knabo, ĉu ne?
- Vere, ne temas pri knabo, ŝi estas knabino.
- Ne, li estas ja knabo.
- Ne: ŝi estas mia filino.
- Do, vi estas ŝia patro.
- Ne, mi estas ŝia patrino.

Karabenisto en hotelo:

- Ĉu vi ne havas ĉambron iom pli granda?
- Sinjoro, ĉi tiu estas la lifto.

En juĝejo 1

– Sinjoro juĝisto. Mi havas en mia ĝardeno pomar-bon, kies branĉo etendiĝas en lian korton kaj li prenas por si la pomojn, kiuj falas tien. Sed la arbo estas mia, do ankaŭ tiuj pomoj estas miaj.

- Vi pravas.
- Sed la pomoj, kiuj falas en mian korton ja estas miaj!
- Vi pravas.
- Sinjoro juĝisto, neblas, ke ambaŭ estas pravaj.
- Sinjoro sekretario, ankaŭ vi pravas.

Inter geedzoj

- Verdire mi ne komprenas, kial, inter tiom da viroj, kiuj volis edziĝi kun mi, mi edziniĝis ĝuste kun vi.
- Ĉar mi estas ĉiam mal-bonŝanca.

Inter skotoj

- Mi vidas vin ĝoja; kio okazis al vi?
- Vere: Mi ŝparis la kostojn de la divorco-proceso.
- Kiel eblas: vi jam ankoraŭ ne edziĝis!
- Ĝuste pro tio. Mi decidis forlasi mian fianĉinon.

En juĝejo 2

- Hontu! kiel vi povis esti tiel perfida por trompi homon, kiu fidis je vi?
- Pardonu, via moŝto. Ĉu vi povas lernigi al mi, kiel mi povus trompi homon, kiu ne fidis je mi?

La kialo

- Kial vi ne laboras? Vi vivus pli bone, se vi laborus.
- Vidu: kiam mi estis en la lernejo, mi havis du amikojn. Unu, tre laborema fariĝis milionulo, la alia, mal-laborema, restis malriĉega kiel mi.
- Do, vi vidas!
- Sed la milionulo mortis pro tro da laboro, kaj la malriĉulo edziĝis kun lia vidvino.

http://www.ueci.it/k_sento/ks_2018/

